

ZPRÁVY

KLUBU ESPERANTISTŮ V PRAZE

ADRESA : PRAHA : HLAVNÍ POŠTA, SCHRÁNKA 1069

Klub esperantistů v Praze
Řeznická 17, Praha 1
poštkesto1069

3/-a numero
julio – decembro 1970

Karaj geamikoj,

mi ĝojas anonci al vi, ke dum lastaj monatoj multaj novaj homoj vizitadas niajn kunvenojn, kiuj okazas ĉiulunde en Řeznická strato 17, Praha 1. Bedaŭrinde ankaŭ kelkaj niaj malnovaj membroj nun ne venadas. Kial? Ĉu ili jam ne ŝatas Esperanton? Ĉu Esperanto estis por ili nur hobia? Vi certe scias, kio estas la hobia. Vi estas ŝatokupo, kiun oni faras dum sia libera tempo (ekz. kolektado de poŝt-markoj, de insignoj, de glumarkoj ktp.). La hobion oni povas forlasi, kiam oni ne plu ŝatas ĝin. Sed amatan aferon oni ne povas forlasi. Do, karaj geamikoj, se Esperanto estas korafero por vi, vi ne povas forlasi ĝin kaj nian klubon.

Esperanto faras nian vivon pli riĉa, pli interesa. Sed kompreneble oni devas praktiki ĝin, perfektigi en la lingvo kaj tio ĉi estas ebla precipe per konversacio. En nia klubo vi havas multajn eblecojn por la konversacio (babilado ĉe taso da kafeo aŭ teo, diskuto pri aktualaj temoj, rakontado de diversaj aferoj, demandoj post la paroladoj ktp.). En nia klubo vi ankaŭ povas pruntepreni diversajn gazetojn. Por pliperfektigi en la lingvo la legado estas ankaŭ tre bona, eĉ necesa rimedo. Dum la tuta jaro en la komenco de la programo en nia kunveno okazas gramatika leciono, kiun gvidas eminenta esperantisto s-ro Slanina. Tiujn ĉi lecionojn vi ankaŭ povas profiti. Do, ne forlasu niajn kunvenojn kaj nun en aŭtuno denove alvenadu!

NI KOREGE BONVENIGAS NOVAJN ANOJN DE NIA KLUBO KAJ ESPERAS, KE ILI ESTOS FIDELAJ AL NIA MOVADO. En nia gazeto vi povas legi pri temoj de la paroladoj okazantaj dum aŭtunaj kaj vintraj monatoj. NOTU ILIN BONE KAJ INVITU VIAJN GEAMIKOJN: VARBU NOVAJN MEMBROJN KAJ PROPAGANDU NIAM LINGVON KIE AJN!

D-ro Rudolf Horský
prezidanto de la Klubo

Ĵuri Tuulik

Aŭtuno

Pluvis, pluvis akre, malvarme el pezaj nuboj. Mi estis sub la pluvo, meze de arbaro, ĝisgenue en flaviĝanta herbo. Senĉese pluvadis, seninterrompe, ĝis forpluviĝis la somero. La tero trinkis, ŝvelis sub miaj piedoj, ekodoris je fungoj. La arboj soife trinkegis, laciĝis, la folioj senforte falis teren, falis sur miajn piedojn, sur la fungojn, malaperis en herbo. Unu post alia venis ventoj tra la nuda arbaro, soife trinkegis kaj iris pluen, unu post alia, unu apud alia, unu preter alian, ĉiuj de pluvo ŝvelintaj, pezaj. Elvenis la suno, trinkis, ridetis malĝoje tra flava akvo, foriris kaj forgesis reveni. Mi plue estis sub la pluvo, vizaĝo al la nuboj, la haroj pendantaj al la tero, Miaj okuloj estis nun klaraj, grizaj, senpasiaj. Sed mi mem estis la antaŭa. La tuta pluvo pluvis preter min, laŭ mia vizaĝo, laŭ mia brusto, lumboj suben, enfluis en la herbon, sorbiĝis en la teron. En mi mem estis plue ankoraŭ somero, estis en la koro, en la sango, en la histoj kaj ankoraŭ ie. Mi atendis, laciĝis atendi, la ardaĵ

someraj fulmoj ne malvarmiĝis en mi.

Kiom longe mi devas atendi?

Longe, ĝis la lumo en mi koagulos. Ĉiu sangoglobeto en mi iam fariĝos sablero, kiun la aŭtuna rapidanta laca pluvo lavas, lavas. Mi devas atendi mian humiĝon.

el la estona tradukis Valev Kruusalu

korektis Kalju Pill

(s-ro Valev Kruusalu vizitis nian klubon ĉijaran marton)

Klub esperantistů v Praze vydal v těchto dnech knížku svého předsedy Rudolfa Horského

C e s t a d o Š p a n ě l

Je to soubor reportáží z cesty na esperantský kongres v Madridu v roce 1968. Knížka je doprovázena kresbami Františka Rydvala, Cena Kčs 7,—, s poštovným 8,—. Objednávky vyřizuje KEP, poštovní přihrádka 1 069, Praha 1.

K u r s o j - K u r s y

Ing. Felix – Por progresontoj – ĉiun lundon 6-7. h, en la Klubo.

Ant. Slanina – Pro začátečníky. Kurs bude zahájen v úterý 6. října v ZDŠ Sázavská 5, Královské Vinohrady, Praha 2 (tramvaj 1, 16, 22, stanice Mírové náměstí). Osvědčený učitel esperanta p. Antonín Slanina bude vyučovat podle moderní metody "Inter". Účastníkům kursu se doporučuje, aby si přinesli sešitek na slovíčka a sešit hned na první hodinu. Taktéž nutno nosit obuv na přezutí!

P r a h a

Vi, Praha, viaj turoj
palacoj kaj kastelo
riveraj plaŭdsusuroj,
Reĝino Vi, juvelo.

Aŭror' de l' Regiono,
kastela katedralo
kvazaŭa glorotrono
kantiko, laŭdhoralo

Flustradas la iamo
en vi pri oraj gloroj
en mia koro aro,
pro vi la metaforoj.

Jam en anim' sonoras
mirindaj melodioj
antikvaj, vin honoras
serenaj simfonioj.

Kaj per gitaro-kordoj
knabin' pri amo kantas

dum inter ĉarmaj bordoj
Vltava elegantas

Sub romantikaj pontoj
la voĉo de l' iamo
areto el la fontoj
pri grandioza famo

Ĉi tie en iamo
rondiris kavaliroj,
malamo, nobla amo
herooj kaj martiroj

Vin ame mi honoras
per la poetoliro
dumvive Vin menoras
eĉ dum plej lasta spiro

dediĉe al la Esperantista
Klubo en Praha kaj al la
ĉeĥa popolo
Anton A. Leenharu
Nederlando

A ŭ t u n a j k a j v i n t r a j p r o g r a m o j

21. IX.	J. Ondráček	Lego kaj komentario de la libro "Paroladoj" de d-ro Ivo Lapenna (unua parto) Čtení a komentář knihy "Projevy" Dr. Ivo Lapenny (první část)
28. IX.	E. Urbanová Inĝ. Felix	Ne timu la poezion! Nebojte se poezie!
5. X.	Anĉi Bárachová	Rememoroj de esperantistino Vzpomínky esperantistky
12. X.	J. Ondráček	Lego kaj komentario de la libro "Paroladoj" de d-ro Ivo Lapenna (dua parto) Čtení a komentář knihy "Projevy" Dr. Ivo Lapenny (druhá část)
19. X.	Bedřich Dryák	Kvizo kun lumbildoj "Dek sekundojn kaj ne pli!" Kvíz s diapozitivy "Ne víc než deset vteřin!"
26. X.	Arch. Drlík	La 28-a de oktobro 28. říjen
2. XI.	Oldřich Kníchal	Mia ĉi-jara vojaĝo al Japanujo Má letošní cesta do Japonska
9. XI.	Inĝ. Felix Arch. Drlík	J. Á. Komenský - "Via lucis" La Granda Oktobra Revolucio Velká říjnová revoluce
16. XI.	Dr. R. Horský	330-jara datreveno de J. A. Komenský – La porpacaj klopodoj 300-leté výročí J. Á. Komenského

23. XI.	Jar. Tomčík	Komenského mírové snahy Miaj rememoroj pri Theodoro Čejka, pioniro de Esperanto en la ĉeĥaj landoj Mé vzpomínky na Theodora Čejku, průkopníka esperanta v českých zemích
30. XI.	Dr. Jermář	Mi vivis unu jaron en Liĥtenŝtejno Žil jsem rok v Lichtenštejnsku
7. XII.	Junularo	Nikolaa vespero Mikulášský večer
14. XII.	Dr. R. Horský	Zamenhofa vespero. Koncerto – kantos kantistino Hana Řípová akompanata de D-ro L. Řípa Zamenhofův večer. Koncert – zpívá pěvkyně Hana Řípová za doprovodu JUDr. L. Řípy
14. XII.	Dr. R. Horský	La senco de Kristnasko Smysl vánočních svátků
28. XII.	Ant. Slanina	Silvestra vespero Silvestrovský večer

En ĉiu kunveno: La gramatika dekminuto de Ant. Slanina
Viva gazeto – novaĵoj kaj informoj el la esperanta gazetaro (Jarmila Králová)
Informoj el la ĈEA (Ing. Fr. Sviták)
Kion alportis la posto (Dolfa Bartošík)

JAN ÁMOS KOMENSKÝ (COMENIUS)

granda ĉeĥa mezepoka filozofe (1562 - 1670) mortis antaŭ 300 jaro jaroj. Nia klubo rememoris tiun gravan datrevenon per prelego de sia prezidanto D-ro Rudolf Horský. Tamen ni revenu al tiu ĉi temo ankoraŭfoje.

Komenský estis vera "Homo Dia". Li vidis superan taskon de la homa gento en "servo al Dio" , kion ni en hodiaŭa parolmaniero interpretus kiel servo al ideoj de paco, plialtigo de la homa moralo, de interhoma amo, justeco kaj vero. Li estis ĝisosta pedagogo. Spertinte, kiajn miraklojn povas fari bona edukado, li kredis – kiel ankaŭ ni kredas – ke la sola vojo al pli alta homa nivelo estas amplena, klera kaj alloga edukado, kaj de infanoj kaj de plenaĝuloj.

Sed Komenský travivis preskaŭ duonon de sia vivo en tempo de la Tridekjara Milito. Tridekjara sensenca batalado de potenculoj pri potenco kaj povruloj pri vivo. Sur propra haŭto, kiel ekzilito, li spertis, ke milito malebligas veran edukadon, ĉar milito havas sian propran moralon, plejparte rekte kontraŭan al la moralo humana. Evidente peko, kiel trompo, mistifikaĵo, murdo, ricevas en la milito noblajn nomojn kiel "militruzo", "soldathonoro" ktp., kaj fariĝas subite laŭdinda virto. Kio sur unu flanko de la militlinio estas hontinda trompo, sur ĝia alia flanko estas estiminda merito. Kaj krome sur la unua flanko oni parolas per mane, sur la dua svede, do neniu reciproka interkompreniĝo estas ebla.

Komenský dediĉis multe da klopodo al instruado de lingvoj. "La pordego de lingvoj malfermita" (1631), "La mondo bildigita" (1653) kaj aliaj liaj verkoj estas dediĉitaj al tiu ĉi malfacila tasko. Tiu laboro gvidis lin al serioza, ĝisfunda studado de unuopaj lingvoj. Kaj komparante ilin, li trovis, ke ĝuste tiuj ecoj, kiuj plej grave malfaciligas ilian lernadon (komplikitaj gramatikaj reguloj, amaso da esceptoj) ne celas pli perfekte esprimi la ideon, sed estas superflujaj postrestoj de malnovaj stadioj de la evoluo, plejparte jam plen senfunkciigitaj.

Do, ne estas mirinde, ke post longa klopodo, celanta ĝeneralan klerigon kaj interkompreniĝon, li venis al rezulto, ke "pli facile estas por ĉiuj ellerni unu (lingvon), ol por unu ellerni ĉiujn. Al tiu ideo li venis en sia verko "Via lucis" (Vojo de la lumo), eldonita en Amsterdam 1668. Kaj en la sama libro li ankaŭ logike precizigas la postulojn al tiu lingvo. Ĝi nepre devas esti artefarita, ppor eviti ĉiujn neutilajn malfacilaĵojn, ekestintajn pro neklereco de la praantaŭuloj. Legante tiun libron, oni legas kvazaŭ instrukcion pri la metodiko de Esperanto. La latina, tiam ekzistanta internacia lingvo de kleruloj, per kiu li mem ĉiujn siajn verkojn skribis, aperis el tiu vidpunkto tute maltaŭga.

Oni eĉ miregas, ke devis forflui 219 jaroj, antaŭ ol troviĝis alia geniulo, kiu tiun projekton realigis. Ni gardu kiel propran pupilon tiun ĉi heredaĵon, ĉar ne ĉiu jarcento naskas tiajn geniulojn kiel Komenský kaj Zamenhof.

Felix

ESPERANTISTOJ FESTIVALIS EN OPAVA

Pluraj membroj de nia klubo, inter la ĉ. 150 partoprenantoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Bulgario kaj GDR, ĉeestis la II-an Esperantistan Kulturalan Festivalon en Opava kaj Hradec u Opavy (3 - 6 julio), aranĝitan omaĝe al la 200-a naskiĝ-datreveno de Ludwig van Beethoven.

La programoj, la nivelo de la festivalo kaj la aktiva partopreno de reprezentantoj el la sciencista kaj artista medioj estis de la speco, kiu inspiras ĉe partopreninto internan kontentigon jam pro la simpla fakto, ke oni apartenas al movado kapablanta vekti respekton per siaj faroj. Muzikologo M. Malura el la Beethoven-Societo prelegis incite pri la "Kreinto de nova muzikepoko" en Opava, kaj la Arĉkvarteto de Ostrava ĝuigis al ni la muzikon de Beethoven kaj Smetana rekte en la ĉeĥoslovaka centro de esplorado pri Ludwig van Beethoven, la bela kastelo Hradec apud Opava, intime konita de la granda komponisto. Artistoj de la Opava teatro prezentis kun bela sukceso ne sole artoprogramon kun esperantlingvaj eroj (i. a. Manon Lescaut, versdramo de Vítězslav Nezval), sed neatendite surprizis la trairantajn festivalanojn en pluraj ĉambroj de la Hradeca kastelo: en tiu eksonis tonoj el ĉaskornoj, en alia duonluma ejo kun fenestro supermistera valo subite revivigis kun la tonoj de mallaŭta muziko, ŝtoniĝintaj figuroj de baletistoj por danĉprezenti la Luno-sonaton de Beethoven. Similaj surprizoj ripetiĝis en aliaj ĉambroj – ĉio nur por la festivalanoj. (La "surprizoj estis kompreneble sufiĉe "karaj" por la festivala kaso! Sed, kion la aranĝintoj ne provus por vekti fortajn impresojn?)

Sed oni ne povas ne mencii ankaŭ la ĉarman alivesperan surscenigon en la Internacia Lingvo, realigitan de infana E-rondeto ZK Ostroj (scenoj el La Avinjo de Božena Němcová).

En la jaro de J. Á. Komenský la festivalo ne povis preterlasi la malnovan pioniron de nova internacia lingvo, post la latino. Dignan omaĝon al li kaj lia verko la festivalo faris per prelego de D-ro Vlastimil N o v o b i l s k ý.

La gravecon de la aranĝoj substrekis plenkunsido de la CK de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Opava kaj kunsidoj de ĝiaj sekcioj, oficiala reprezentiĝo de kvar alilandaj Esperanto-Asocioj kaj ne lastvice ankaŭ dulingva stampo de la loka poŝto. Ekskurso bone kompletigis la festival-programon: Fulnek (muzeo kaj laborejo de Komenský), Nový Jičín (ĉapel-muzeo), Příbor (Ĉejka-memorŝtono) k.a.

La opavanoj antaŭplanas la 3-an festivalon, post kelkaj jaroj. La motivo: 700 jaroj de Opava.

Oficiala poŝta stampo

Ĉeĥoslovaka Poŝto uzis okaze de la 10-a Internacia Renkontiĝo en Poděbrady stampon kun jena dulingva teksto: 10. jubilejní setkání esperantistů – 10. Jubilea Renkontiĝo Esperantista – Poděbrady.

-jm-

Internacia ekspozicio trajnomodeloj okazis aŭguston en Praha – Karlín en la Pionirdomo. Klarigojn en la Internacia Lingvo oni povis ricevi de afergvidantoj la verdan stelon.

- jm -

Interesa intervjuo en la praga radio-elsendo

Marde la 25-an de aŭgusto elsendis Radio Praha en sia matena programo "A léta běží, vážení" tre interesan interparolon de la radio-redaktorinoj Alena Tučková kaj Alena Macháčková kun 80-jara s-no Kaplerová el Brno.

En 45-minuta elsendo ni povis sekvi vivovoĵojn de simpla, sed tre inteligenta virino. Kiel juna sinjorino ŝi ekinteresiĝis ankaŭ pri Esperanto. Foje post la unua mondmilito ŝi trovis en tiama konata porinfana gazeto "Malý čtenář" rubrikon pri Esperanto, kiun gvidis juna kaj entuziasma instruistino Julie Šupichová. La lingvo ekplaĉis al ŝi. Jaroj pasis, ĉiutagaj ĝojoj alternis kun zorgoj. La esperanta semo de Julie Šupichová, antaŭ jaroj hazarde trovita en Malý čtenář, ekĝermis nur post la dua mondmilito. En sia 58-a jaraĝo s-ino Kaplerová serioze ekstudis la lingvon en kurso por komencantoj. Tuj poste ŝi tralegis la libron "Mi en li" de Vladislav Vladyka. Diligente, plej ofte dumnokte, ŝi lernis la vortojn. Esperanto plene kaptis ŝian koron. Komenciĝis abunda korespondado, kiu daŭras ĝis nun. Krome ŝi multe legas esperantan literaturon. Dank' al Esperanto ŝia vivo iĝis pli interesa, pli riĉa.

Nun okaze de sia okdekjariĝo s-ino Kaplerová rememoris interalie ankaŭ pri la aŭtorino de la Esperanto-rubriko en Malý čtenář, kiu en junaĝo vekis ĉe ŝi la intereson pri la Lingvo Internacia. Ĉu ŝi ankoraŭ vivas, kie ŝi loĝas, ktp.

Vi povas imagi la surprizon de s-ino Kaplerová, kiam la redaktorino Macháčková persone vizitis 86-jaran s-inon Šupichová en ŝia praga loĝejo kaj pere de radia mikrofono voĉe ŝin kontaktigis kun nia vigla 80-jara esperantistino en Brno. Jes, s-ino Julie Šupichová, la meritplena pioniro de Esperanto en nia lando, aŭtorino de multaj esperantaj lernolibroj kaj de centoj da propagandaj gazetartikoloj, ankoraŭ vivas. Dank' al Radio Praha ni aŭdis ankaŭ ŝian iom tremantan voĉon, ni aŭdis interesan intervjuon, en kiu s-ino Šupichová esperante alparolis la pli junan jubileanton en Brno.

Iom nostalgie finiĝis la tre interesa radio-rakontado de s-ino Kaplerová: "La vivo estas tiel bela kaj mi estas jam 80-jara!".... sed kiel plenriĉe vivita vivo! Ne ĉiu homo povas eldiri tiajn vortojn. Eble tamen nur esperantistoj, kiuj per praktika uzado de Esperanto scias pliheligi la grizon de sia ĉiutaga vivo.

La Esperantista Klubo en Praha postfeste gratulss al s-ino Kaplerová okaze de ŝia malofta vivjubileo, dezirante al ŝi ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn en bonfarto kaj sano meze de ŝiaj karaj familianoj, libroj kaj muziko.

FABA

V-V- V-V-V-V-V-V-V-V-V-V-V-V- V-V-V-V-V-V-V-V- V-V-V-V-V-V-V-V-V-V-V-V- V-V-V-V-V-V-V-V- V-V-V-V-V-V-V-V- V-V-V-V-V

JAPANA KONGRESO EN OSAKA

Proksime de la mondekspozicia urbo, en Takacuki, okazis la 25–26-an de julio la 57-a kongreso de japanaj esperantistoj sub aŭspicio de la urbestro, kiu mem partoprenis solenan inaŭguron. Kiel reprezentanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio salutis la ĉeestantojn s-ro Oldřich Kníchal, kiu tiutempe restadis en Japanio. Dutagan traktadon ĉeestis preskaŭ 600 gesamideanoj.

DATREVENA REMEMORO

Iun belan julian tagon de pasinta jaro malsuprenveturis serpentinojn de Aŭstria montaro Semmering aŭtoĉaro ornamita per esperantistaj emblemoj. Ĝi veturigis grupon de Esperantistoj el Mělník revenantan hejmen el Jugoslavio. Matene transveturinte la limon, ili mallonge haltis en Graz, kaj ilia celo estis Edlach A/RAX. Tie ĉe s-ano Hubalek, posedanto de Esperanto-hotelo, jam estis antaŭ du monatoj mendita refreŝigo por nia grupo. El montara tereno ni subite troviĝis en riĉa verda valo. Sur ŝoseeto borderita de herbejoj kaj arĝenta torento, la aŭtoĉaro celis sub alian montĉenon – Raks-Alpon. Tie ĉe piedo de 2006 m alta Rakso, en la najbareco de banloko Reichenau kuŝas ĉarma vilaĝo Edlach.

Precize je fiksita horo je la 11-a antaŭtagmeze ni atingis la hotelon. Ridetanta, sincera kaj amoplena vizaĝo de s-ano Hubalek mem, estis jam por ni ĝojiga bonvenigo. Sed nia renkontiĝo estis ankoraŭ multe pli ĝojiga per neatendita surprizo. Aliaj gesamideanoj (pr. 10) el la ĉirkaŭaĵo, informitaj pri nia alveturo, venis en siaj aŭtomobiloj por saluti nin.

Ni estis kondukataj en grandan aeran manĝejon, ornamitan per Esperanto-flagoj, sidiĝis al tabloj kovritaj per blankegaj tablotukoj. El la teleroj bonodoris unu el la specialaĵoj de fama kuirejo de s-ino Hubalek. Bonega supo kun freŝe bakitaj bulkoj kaj glaso de ŝaŭmanta mineralakvo. Poste la junularo kuris en ĝardenon por admiri belegan panoramon de la Raks-Alpo, ni plenaĝuloj grupiĝis por babili – oni fotografis, filmis ktp. Sed ho ve...! - tempo limigita rapide forpasis kaj ni devis adiaŭi kun niaj novaj geamikoj.

Jen nova surprizo! Sinjorino Annie, filino de la geedzoj Hubalek, aliris aŭtoĉaron kun harmoniko sur la ŝultro, ludante, ŝi kantis al ni kanton "Auf Wiedersehen!" Ni estis kortuŝitaj, kelkaj eĉ ne hontis pro larmoj. Kaj tiam ni ankoraŭ ne sciis pri nobla gesto de la aŭstriaĵo gesamideanoj; nur pli poste ni eksciis pri ĝi. Kiam nia gvidanto s-ano Josef Vitek volis pagi la menciitan refreŝigon por 44 personoj, oni al li diris, ke ĉio estas jam pagita.

Moralan valoron de tiu belo ago oni ne povas per vortoj esprimi. Grandanima koncepto de gastamo profunde influis sentojn de ĉiuj partoprenintoj kaj ĉefe por nia junularo ĝi estis instrua pli ol kiu ajn prediko. Belega rememoro restos por ĉiam en niaj koroj.

PhMr L. Plaňanská

Favora sciigo por bestbredantoj

Bestkuracejo kaj bestdeponejo en Praha: Ĉiuj bredistoj de hundoj kaj aliaj bestoj povas eluzi servojn de bestkuracejo en Sobín apud Praha. Ĝi situas nur 5 km okcidente de la finstacio de tramo n-ro 9 en direkto al Plzeň. Urba aŭtobuso n-ro 164 veturas de Motol ĉiun duonhoron, de Bílá Hora ĉiun horon al Zličín. De tie 10 minutojn piede al Sobín. Gvidanta bestkuracisto D-ro Svátek estas ano de nia klubo kaj fakdelegito de UEA. Deĵortempo 7 –15. Telef. numero 35-15-51.

ooo

Eventuala tradukinto aŭ kuraĝa tradukonto de "La Travivaĵoj de la Brava Soldato Ŝvejk dum la Mondmilito" de Jaroslav Hašek serĉata. La libro povas aperti ĉe Heroldo. Kontakto s-ron Ivo Železný, poŝtkesto 7, Praha 56.

Pokladní zpráva

Asi před měsícem jsme všem dlužícím členům Klubu i Svazu zaslali upomínkové dopisy zároveň se složenkami k zaplacení členských příspěvků. Mnozí z nich pochopili svoji povinnost ale 70 členů bohužel ještě příspěvky dluží.

Z 216 členů Klubu přihlásivších se do Českého esperantského svazu neuhradilo členské příspěvky 17.

To třetího čísla Zpráv přikládáme opět složenky doufajíce, že všichni, kdož tak dosud neučinili, do konce roku svou členskou povinnost splní. Dětujeme Všem, kteří naše esperantské hnutí podporují. Klubové i svazové legitimace i patřičné známky k nim jsme rozeslali a taktéž Zprávy pravidelně zasíláme. Svaz vydal dosud tři čísla svého orgánu Starto. První číslo dostali všichni, ale dvě další čísla posíláme vždy až po zaplacení členského příspěvku.

Potud by někomu něco chybělo, něco snad nedošlo, zašleme na požádání dodatečně. Ty členy, kteří se už o členství v Klubu nebo Svazu nezajímají, žádáme, aby buď toto číslo vrátili nebo nám napsali. Chceme mít v členské kartotéce pořádek. Děkujeme všem za pochopení.

Anna Bárochová
pokladní

La 25-an de aŭgusto mortis en sia benita aĝo de 97 jaroj altestimata "paĉjo" s-ro Alojz K r e m e r , estinta vicprezidanto do La Esperantista Klubo en Košice, kiun li kun ankaŭ jam mortinta D-ro Friedrich fondis. La Klubo havis en la periodo inter du mondmilitoj pli ol 300 membrojn.

Longjara membro de nia klubo s-ro Jan B. M o l n á r festas la 30-an de septembro sian 75-an vivjubileon. Esperanton li eklernis jam en la jaro 1907. Ni deziras al li multajn pluajn jarojn.

EK Praha ekskursis

La 17-an de majo matene je la 8-a horo ekveturis du aŭtobusoj de Ĉedok, direkto Beroun, al Koněprusy. En la unua estis 17, en la dua 22 esperantistoj. Geklubanoj de EK Praha ekskursis al grotoj de Koněprusy, honore al novmalkovrita kaj je la nomo de D-ro L. L. Zamenhof inaŭgurita groto. Bedaŭrinde, veninte tien, ni nek la groton vidis, nek la gvidistino ion pri ĝi sciis. Ĝi estis anoncita en la gazetoj, sed verŝajne ĝi estas unu el tiuj tri novaj grotoj, kiuj ankoraŭ ne estas publike alireblaj. Do ni devis kontentiĝi kun la espero, ke unu el tiuj tri vere portos la nomon de nia majstro. Ĉar la dio de la vetero estis al ni favora, ni en bona humoro daŭrigis tra rava regiono de Srbsko al perlo de niaj kasteloj - Karlštejn. En kastela restoracio ni bone, kvankam sufiĉe multekoste manĝis, kaj post komuna trarigarde de la kastelo ĉiu laŭplaĉe povis ĝui sunan dimanĉan posttagmezon. Espereble tiu ĉi ekskurso ne restos la lasta kaj ni aŭtune daŭrigos.

Milada Josková

Rozpad angličtiny - La disfalo de la angla lingvo

Pan M. H. King z Nového Zélandu, jehož mateřtinou je angličtina, sděluje pod tímto titulkem v japonském časopise Oomoto č. 355-356, že porušení povinného studia angličtiny na vysokých školách v Japonsku od roku 1973 následuje závažné rozhodnutí novezélandského ministerstva školství, jímž se angličtina prohlašuje za nepovinný předmět pro zkoušky, jež jsou podmínkou k přijetí na zodpovědné místo a do úřadů na Novém Zélandě.

Používání správné angličtiny se stalo ztraceným uměním – konstatuje se v článku. Důvodem pro ono rozhodnutí je zjištění odborníků ze školství, že angličtina jako učební předmět je příliš těžká pro průměrné, anglicky hovořící dítě, než aby jí rozuměl. Článek obsahuje na ukázkou seznam běžných slov, jež ani jeden kandidát zkoušek nebyl schopen napsati správně.

- jm -

